

Heinrich Heine,
La ruĝaj teksistoj

tradukita de Emil Pfeffer

En senlarma okul' kaŝante la sentojn,
Ili sidas kaj teksas kaj grincas la dentojn:
Malnova mond'! Ni teksas en pen'
Morttukon al vi kun triobla malben' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al diaĵo, al kiu kun preĝo
Turniĝis en frosto, malsato kaj neĝo
Ni kaj atendadis en vana esper' ...
Ĝi mokis kaj ridis je nia mizer' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al la reĝo, la reĝo de riĉaj,
Senkora vampiro por ni malfeliĉaj,
Senigis li nin de la lasta mon',
Nun oni nin pafas laŭ lia ordon' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al falsa la patrolando,
Kie regas tiaj vampiroj en bando,
Elsuĉas vivsukojn el ĉiu jun-flor',
Protekt' nur por vermoj, putraj', malhonor' -
Ni teksas, ni teksas!

Kaj krakas teksilo kaj flugas ŝipet',
Ni teksas sen ĉes', kun la mort' pro l' vet' ...
Malnova mond'! Ni teksas en pen'
Morttukon al vi kun triobla malben' -
Ni teksas, ni teksas!

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de EMIL PFEFFER (*1891-12-16 - †1965-11-20) en 1929.*

Arg-240-481 (2004-05-24 22:44:39)

La traduko de Emil Pfeffer aperis en la sveda revuo "Svenska Arbetar-Esperantisten" (= "La sveda laborista Esperantisto", en la septembra-oktobra numero de 1929, sur paĝo 83. Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiujn informojn kaj la tradukon de Emil Pfeffer en la libro "Verkoj de Heinrich Heine" de Adolf Holzhaus, eldonita en 1973 de la "Esperanto-Ligo en Israelo".